



SALUTON !

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

20 Septembro 2005

№ 12

Redaktoro: Araneo

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
FAX: (708) 456-2750

Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer
Vicprezidanto – Karlo Offutt
Sekretario – Viktoro Pajuk
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of our Society.
Check should be payable to:
The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our
Treasurer, Charles Gunn,
828 S. Ada, Chicago IL 60607

Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Denove saluton, estimata leganto! Hodiaŭ ni havas novajn rememorojn pri agrabla UK en Litovio kaj ankaŭ tute 'nigran' novaĵon. Legu mem ĉion laŭ la vico.

Neforgesebla UK en Vilno. II

II.a. Pasis 18 jaroj de kiam mi lastfoje partoprenis UKon kaj 42 jaroj depost mi partoprenis mian unuan. Do, mi revenis al Vilna Kongreso por iom nostalgie rememorigi, kiel la UKoj funkcias nun.

Kion mi trovis? Ho! Multajn rutinajn ekzakte-la-samajn erojn de la kongresa programo., sed ankaŭ iajn novaĵojn por mi. Ekzemple: la flago ne plu havas alkudritajn datojn de la antaŭaj kongresoj.

Nova por mi estis amaso de la kongresaninfanoj - oni rajtis aligi ilin senpage, do la juna verda etularo videblas kaj ĝojigas la koron dum la Kongreso. Ili eĉ ne ankoraŭ vivis, kiam mi kongresis lastfoje..! Kaj ho ve, multaj amikaj malnovaj vizaĝoj tiel ŝanĝiĝis dumtempe, ke mi malfacile rekonis iln... Jes-jes, ili la samon diris pri mi!

La ekstermura interkona vespero estis surprizo, same la balo en "pizzeria" ĉe la rivero. La libroservo plikreskis imprese. Tute nova estis por mi la ĝuebla aukcio majstre gvidata de d-ro Tonkin. Impresa estis la aro de la simpatiaj lokaj helpantoj, kiuj sindone oferis tempon kaj energion por la eksterlandanoj en la Kongresejo kaj tra la urbo.

En Vilno mi estis la unuan fojon, kaj mi tuj enamiĝis en tiu vidindaplana ĉarma urbo! Viziti Vilnon estis mia longedaŭra revo, ĉar la vizaĝon de la Vilna Dipatrino mi ricevis kiel donacon ĉe mia bapto, sed mi neniam antaŭe havis la okazon vidi la originalon en la Akra Pordego. Same mi ĝojis havi la renkontiĝon kun la fama... Barbara Radziviluvna, la malfeliĉe mortinta juna pola reĝino de antaŭ jarcentoj, en kies tombon sub la Vilna katedralo mi sukcesis enpaŝi. Mi ankaŭ ĝojis viziti la tombon de Sankta Kazimiro, la patrono de mia patro kaj de mia baptopatrino. Kaj la koron de la pola heroo Marŝalo Pilsudski, entombigitan ĉe lia patrino en la Rosa Tombejo...

Interese estis vidi kiel vivas en Vilno la nuntempa polaro: mi partoprenis la koncerton e Mickiewicz Muzeo, kaj vidis polan preĝejon plenplenan de pilgrimantoj. Interese estis aŭskulti la lokan Polan Radion en Vilno, kies voĉoj ĉarme diferencas de tiuj de Pollando.

Ŝoforante per aŭto de Pollando al Vilno kaj reen mi havis la okazon viziti multajn gefamilianojn, kiuj nun disiĝis ie en vasta Pollando.

Krom la kuzinoj kaj iliaj idoj, mi ankaŭ vizitis mian preskaŭ 100-jaran onkilnon, kiu memoris min kiel knabon, sed kiun mi neniam vidis poste. Ĉio dank' al Esperanto, ĉar se ne pro la Kongreso, mi eĉ ne estus konsiderinta vojaĝi al Litovio...



Leszek

UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –

Home of a comprehensive FAQ list

http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;

toll free: 1-800-ESPERANTO

(1-800-377-3726)

<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association

<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet

<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course

<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/va/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation

<http://esperantic.org>

Pasporta Servo

<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format

<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:

<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

28an de Septembro – d-ro Puramo Chong gvidos nin tra la kamparo de orienta medicino

26an de Oktobro – reelekta kunveno: ni sumos la jaran agadon kaj estraro raportos pri sia aktivado; kune ni ellaboru planojn por la 2006 jaro kaj vidu la filmon de s-no Walter

23an de Novembro – la temo estos anoncota (la nova estraro preparos sin al la Z-bankedo)

Baldaŭ okazos la reelekta kunsido. Bv. sendi kandidat-proponojn por nia estraro (se eblas – kun foto kaj noto)

II.b. La 90-a Universala Kongreso en Vilno evidentiĝis kiel granda sukceso konsiderante la nombron de partoprenantoj, kvaliton de programoj kaj servoj. Ni certe povas diri ke ĝi estos neforgesebla. Hotelo *Reval* taŭgis bonege por tiu celo: enhavis sufiĉe da ĉambroj por kongresanoj kaj sufiĉe da lokaloj por funkcionado de estraro kaj por klerigaj celoj.

Oni kalkulis 2300 partoprenantojn kaj tio estis la surprizo por Vilno, ĉar tiun amason de eksterlandanoj oni ne ofte vidas.

La plej emocia evento estis la solena malfermo en la Siemens Arena, la loko, kiu facile povis enteni ĉiujn kongresanojn. La akustiko estis tiel altnivela, ke oni povis bone aŭdi eĉ de malproksimaj lokoj. Ĉiuj paroladoj estis tre interesaj, sed mi ŝategis la paroladon de sinjoro Rosetti, ne nur pro la elokventeco, sed por lia itala akĉento, kiu ornamis Esperanton kaj similis al belsona itala. La programo de la Kongreso estis riĉa, interesa kaj informplena, donante al ĉiuj la okazon por lerni, plibonigi la Esperanton, ĝui la etoson, konatiĝi kaj amikiĝi kun samideanoj de aliaj landoj.

Persone, por mi la Kongreso estis duoble agrabla: antaŭ la milito dum 5 jaroj mi studis en la Univesitato de Vilno. Estinte junulo mi ĝuis la vivon kaj nun mi volis refreŝigi memoraĵojn. Tiutempe Vilno estis belega pola urbo, ĉar pola estraro zorgis pri ĝia evoluo kaj progreso. Stefan Batory, la pola reĝo, en XVI jc fondis la Univesitaton, kiu estis bone konata en Eŭropo.

Nun Vilno estas bela, sed oni rimarkas neglekton kaŭze de la milito kaj la rusa okupado.

Merkredo estis nia libera tago kaj ni povis profiti de multaj organizitaj programoj. Mi vizitis faman kurorton en Druskieniki, poste mi vojaĝis al Kovno, kie loĝis kaj laboris Zamenhofo. Ni vidis lian skulptaĵon en la parko kaj lokon ĉe la bela lago, kie staris lia domo.

Ankaŭ la fermo de la Kongreso esti emocia evento. Ni aŭskultis belajn litovajn kantojn kaj atestis multajn personojn, distingitajn pro ilia laboro en la Esperantujo.

Fifine mi adiaŭis amikojn kaj samideanojn, preninte kun ni neforgeseblajn travivaĵojn.

Walter Cebulski

Lastmomente...

Kiam ĉi numero de nia bulteno estis preskaŭ finpreparita, atingis redakcion informo de nia d-ino G. Novak, ke lunde, la 19an de Septembro ŝi partoprenis kelkminutan radioelsendon (pri Esperanto) sur la ondoj de Northeast Universitato Radiostacio.

Kun bedaŭro ni informas vin, ke la 11an de septembro ĉesis bati arda koro de fervora samideanino, prezidintino de nia societo **Janet Bixby**. Ĉiuj, kiuj konis ŝin persone, substrekas ŝian talenton kaj sindonon en la laboro por IL, ŝi vere estis enkorpiĝo de verda ideo kaj kontribuis forte kaj sincere al ĝi. Survivis ŝin en Virginio edzo Fred kaj filino Jayann.

Societanoj

Por vi serĉis la novaĵojn de la tuta E-mondo redaktoro kaj via obeema servanto. Estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!



araneoesp @ yahoo.co.uk